

## Enhavo

1	Festlibro por Humphrey Tonkin.....	1
1.1	La transdono de la festlibro .....	2
1.2	La enhavo de la festlibro .....	2
2	Omaĝo al Humphrey Tonkin ( <i>Detlev Blanke, Ulrich Lins</i> ).....	8
3	Omaĝaj vortoj de Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof .....	11
4	Bibliografio de la verkoj de Humphrey Tonkin .....	11
4.1	Monografioj .....	12
4.2	Redaktitaj antologioj kaj aliaj verkoj.....	14
4.3	Tradukoj .....	15
4.4	Artikoloj.....	15
4.4.1	Publicaĵoj pri Esperanto kaj interlingvistiko, pri lingvoj kaj lingvo-politiko .....	15
4.4.2	Publicaĵoj pri literaturo, edukado kaj aliaj temoj .....	36
5	Kiel ricevi unuopajn kontribuojn? .....	40

\*\*\*

## 1 Festlibro por Humphrey Tonkin

Kiel ni jam informis en IpI n-ro 71 (4/2009), p. 2, Universala Esperanto-Asocio (UEA) eldonis festlibron honore al sia iama prezidanto, *prof. d-ro Humphrey Tonkin*, okaze de ties 70-jariĝo (2.12.2009).

Al la libro kontribuis 106 personoj kun sume 110 tekstoj. Ĝi krome entenas pli ol 30 fotojn pri la jubileulo kaj aliajn ilustraĵojn. La volumo estas bone bindita kaj havas fortikan kaj belan kovrilon. Temas pri unu el la plej ampleksaj libroj iam ajn eldonita de UEA.

Jen la titolo:

**Blanke, Detlev; Ulrich Lins (red.): La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 901 p., ISBN 9 789290 171133.**

## 1.1 La transdono de la festlibro

La 9-an de januaro 2010 kadre de solena aranĝo, en ĉeesto de la estraro de UEA kaj de ĉ. 50 amikoj kaj kolegoj de la jubileulo, la prezidanto de UEA, *prof. d-ro Probal Dasgupta*, transdonis la festlibron al *Humphrey Tonkin*.

### **En la Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 361, oni legas pri la aranĝo:**

Pri la transdono de la festlibro "La arto labori kune" al *Humphrey Tonkin* aperis jam 10-minuta filmeto en la reta ĵurnalo "UEAviva". Intertempe *Francisco Veuthey* preparis ankaŭ filmon kun la kompleta programo de tiu festa aranĝo. Krom la transdono mem kaj la sekva dankparolado de *Tonkin*, la filmo montras la laŭdparolon de prezidanto *Probal Dasgupta* al la jubileulo, la prelegojn de redaktoroj *Ulrich Lins* kaj *Detlev Blanke* pri la enhavo de la libro, kaj la impresan prezenton de la poemo "La vojo" de L.L. *Zamenhof* fare de *Wera Blanke*.

Reta Kinejo: <http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

UEAviva: <http://www.youtube.com/UEAviva>

La enhavtabelo de la libro, antaŭparolo de prezidanto *Probal Dasgupta*, enkonduko de la redaktoroj *Detlev Blanke* kaj *Ulrich Lins*, kaj omaĝa mesaĝo de L.C. *Zaleski-Zamenhof* troviĝas en [http://katalogo.uea.org/pdf/la\\_arto\\_labori\\_kune-komenco.pdf](http://katalogo.uea.org/pdf/la_arto_labori_kune-komenco.pdf) (kion oni povas elprinti).

"La arto labori kune" kostas 60,00 eŭrojn kaj estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA kaj baldaŭ ĉe aliaj libroservoj. Mendante ĉe UEA oni ricevas rabaton de 1/3 ekde samtempa aĉeto de minimume 3 ekzempleroj. (Aldoniĝas 10% por la sendokostoj kaj en EU imposto de 6%.)

## 1.2 La enhavo de la festlibro

### I Enkonduke

Antaŭparolo  
*Probal Dasgupta*

Enkonduko  
*Detlev Blanke / Ulrich Lins*

Omaĝo  
*Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof*

“Mi kvazaŭ trovis min ĉeĥeje”. Biografia konversacio kun *Humphrey Tonkin*  
*Mark Fettes*

### II Lingvopolitiko kaj lingvoplanado

*Humphrey Tonkin* kaj “Language Problems and Language Planning”  
*Frank Nuessel*

Lingvo – rimedo aŭ resurso?  
*Jouko Lindstedt*

Komunikado kiel fonto kaj motoro de lingva evoluo  
*Vilmos Benczik*

La lingvoj: nemateria kultura heredaĵo  
*Rafaela Úrueña Álvarez*

La lingvobariero kaj la rimedoj por superi ĝin  
*Dan Maxwell*

Lingvaj rajtoj kaj lingva justeco  
*Bengt-Arne Wickström*

Lingvoplanado kaj planlingvoj  
*Federico Gobbo*

Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado. Sub la aspekto de informadika tekniko  
*Liu Haitao*

Vojoj al egalrajta komunikado. Pri kelkaj proponoj kaj reagoj en la fakliteraturo  
*Sabine Fiedler*

De la germana al la angla en sveda ekonomiko  
*Bo Sandelin*

La angla kaj Esperanto: pripensoj pri la estonteco  
*Dalibor Brozović †*

Esperanto kaj Eŭropa Unio: ĉu miraĝo, ĉu perspektivo?  
*István Ertl*

Lingva diverseco kaj la internaciigo de la universitatoj en Eŭropo  
*Michele Gazzola*

Lingvaj homaj rajtoj en Barato. La breĉo inter politiko kaj praktiko  
*A. Giridhar Rao*

La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj?  
*Kimura Goro Christoph*

La lernado de la irlanda lingvo: ĉu helpe de Esperanto?  
*Seán Ó Riain*

### **III Interlingvistiko**

Interlingvismo kaj scienca kulturo  
*José Antonio Vergara*

Memorando pri interlingvoj kaj interlingvistiko  
*Sergej N. Kuznetsov*

Tezoj pri la slava interlingvistiko  
*Aleksandr D. Duliĉenko*

Arto inter lingvo kaj literaturo  
*Věra Barandovská-Frank*

Planlingvaj impulsoj por terminologoj: Wüster, Drezén, Warner  
*Wera Blanke*

Kreo de CDELI kaj ĝia nuna situacio  
*Claude Gacond*

Kiel organizi interlingvistikan agadon? Kelkaj spertoj de GIL  
*Detlev Blanke*

### **IV Esperantologio**

La neebleco de priesperanta lingvoscienco  
*Ken Miner*

La Fundamenta Esperanto: nekontesteble eŭropa, sed...  
*Wim Jansen*

Ĉefaj strukturaj principoj de Esperanto  
*Boris Kolker*

Esperantlingva bildo de la mondo  
*Ilona Koutny*

Instruoj kaj truoj de la Ekzercaro  
*Geraldo Mattos*

Frazeologio, kunokazemo kaj leksiko-gramatiko.  
La ekzemplo de predikato-komplemento-esprimoj en Esperanto  
*Christopher Gledhill*

Reflektiĝo de la specifa Esperanto-kulturo en publicistiko  
*Aleksandro S. Melnikov*

TON-KIN-O. Aŭ: El la rekvizitejo de la Esperanto-poezio  
*Till Dahlenburg*

Kiam Zamenhof perdis sian bastonon. Implicitaj premisoj en planlingvo  
*Klaus Schubert*

La frazmelodio en internacia perspektivo  
*John Wells*

Ŝanĝiĝo de la vortaro en kreolaj lingvoj: la ekzemplo de Esperanto  
*Renato Corsetti*

Sistemo de sufiksoj en etnolingvoj kaj en Esperanto. Similaĵoj kaj diferencoj  
*Otto Prytz*

Kelkaj rimarkoj pri la problemoj de tradukado  
*Michel Duc Goninaz*

## **V Historio**

Hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio  
*Christer Kiselman*

Kritika retrorigardo al la “tezoj” de Esenco kaj estonteco  
*Marc Bavant*

Klopodoj pri lingvokontrolaj institucioj de la Unua Libro ĝis la Lingva Komitato  
*Carlo Minnaja*

Zamenhof, psikologie: de Freud al Piron  
*E. James Lieberman*

Ruĝ-verda malakordo. Observoj pri komunistaj esperantistoj  
*Ulrich Lins*

Inter laborista edukado kaj kultura alternativo.  
Kial laboristoj lernis Esperanton en Hispanio en la komenco de la 20-a jarcento  
*José Antonio del Barrio*

Esperanto kiel araba-juda lingvo, 1924-1948  
*Doron Modan*

Vanaj klopodoj eldoni Esperanto-revuon en la sovetiaj kondiĉoj  
*Vladimir Samodaj*

Ota Ginz. Esperantisto en Ĉeĥoslovakio  
*Vlastimil Novobilský*

En la ombro de aŭroro: pri Takasugi Itiro  
*Tacuo Huĝimoto*

Sur la spuro de Elpin  
*Shi Chengtai*

De TJO al TEJO al TONKIN  
*Ed Borsboom*

## **VI Movado kaj komunumo**

Idealo kaj utilo  
*Werner Bormann*

La esperanta malpopolo  
*Jorge Camacho*

Ĉu “diabla cirklo”? Direkte al sociologia esploro pri UEA  
*Zbigniew Galor*

Enketa esploro pri Universalaj Kongresoj  
*Nikola Rašić*

La katalunaj esperantistoj. Socilingvistika trarigardo  
*Hèctor Alòs i Font*

The geek shall inherit the earth. Esperanto-movado kaj vikipedia komunumo  
en la epoko de la Interreto  
*Ziko van Dijk*

## **VII Apliko kaj disvastigo**

Interkultura edukado per Esperanto  
*Radojica Petrović*

Edukado.net. La porinstruista retejo kaj ESF  
*Katalin Kováts*

Didaktikaj paŝoj  
*Stefan MacGill*

Esperanto kaj medicino  
*Imre Ferenczy*

Pri la faka agado de la fervojistaj esperantistoj  
*István Gulyás*

SAEST kaj KAEST. Pri fakaplikaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj Slovakio  
*Petro Chrdle*

Du jardekoj de Internacia Kongresa Universitato  
*Amri Wandel*

Esperantaj elsendoj kiel natura lingvomedio  
*Barbara Pietrzak*

Kiel aŭdigi nin en la amaskomunikiloj?  
*Thomas Bormann*

Gramatikaj fenomenoj en komputila internaciigo  
*Reinhard Fössmeier*

Kie fluas lakto kaj mielo  
*Mauro La Torre*

Semantikaj suplementoj al sintaksaj dependo-arboj en TRUKILO  
*Victor Sadler*

Novjarmila teĥnologio: ĉu ĝi forpelos aŭ kreos analfabetecon?  
*Toon Witkam*

## **VIII Literaturo**

La postnacia literatura entrepreno kaj Esperanto  
*Probal Dasgupta*

Kial vi verkas?  
*Trevor Steele*

Sub la spoto. Movado kaj movadanoj en la originala dramarto Esperanta  
*Paul Gubbins*

Ĉiu memoro estas protesto  
*Georgi Mihalkov*

Humphrey Tonkin, tradukinto de Shakespeare  
*Baldur Ragnarsson*

Al Tonkin pri Tolkien. Aŭ:  
Kial serioza universitata profesoro interesiĝu pri La mastro de la ringoj ?  
*Anna Löwenstein*

Sinjoro Tadeo parolas Esperante  
*Roman Dobrzyński*

Ĉina klasika beletro en Esperanto  
*Laülum*

Kial valoras legi literaturon en Esperanto?  
*Duncan Charters*

## **IX Strategio**

21-a jarcento – ĉu la Esperanto-movado pretas?  
*Peter Baláž*

Estonto de la cifereca mondo  
*Miroslav Malovec*

Plurlingvismo kaj Esperanto. Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado  
*Jukka Pietilainen*

Protektado de minacataj lingvoj kaj kulturoj.  
Partnereco de UEA kaj UN sub lupeo  
*Edmond Brent*

La financa strategio de Universala Esperanto-Asocio, 1974-1980  
*Gregoire Maertens*

La historio kaj strategio de Esperanto-movado en Azio, 1989-1995  
*So Gilsu*

## **X     Anekdotoj kaj rememoroj**

Humphrey Tonkin: la klereco de la koro  
*Marjorie Boulton*

Humphrey Tonkin, universitata studento  
*Diccon Masterman*

Kure tra duona jarcento  
*Michela Lipari*

Pri kaj por Humphrey Tonkin  
*Ursula Grattapaglia*

Humphrey Tonkin: *eminence grise* de la Esperanto-movado  
*Hans Bakker*

TEJO de mia epoko retrospektive  
*Ivo Osibov*

Humphrey Tonkin – 25jarulo  
*Hans Michael Maitzen*

Junulara Esperanto-vivo en Svedio en la 1960-aj jaroj  
*Ulla Luin*

Tyresö – ĝiaj kongreso kaj deklario  
*Tomas Jansson*

Memoroj  
*Bruce Sherwood*

Revo kaj realo. Renkontiĝo antaŭ 45 jaroj  
*György Nanovszky*

Li apartenas al mia Esperanta vivo...  
*Renée Triolle*

Fragmente pri Universala Kongreso  
*Syôzi Keiko*

Vizito trans la Feran Kurtenon  
*Mikaelo Bronštejn*

Ĉiama Esperanto-parolanto  
*Stefan MacGill*

La riparo de kongresa flago  
*Petâr Todorov*

El la taglibro de Wera Dehler (1981)  
*Wera Blanke*

Ironio milda  
*Eliza Kehlet*

Al monto subluma, admiro senfina  
*Tan Xiuzhu*

Impresoj pri Humphrey Tonkin  
*Orlando E. Raola*

Memoroj de junaĝo pri Humphrey Tonkin  
*Jennifer Bishop*

Somero 1993 en la hejmo Tonkin  
*Spomenka Štimec*

Facila vento ekblovas en EU  
*Etsuo Miyoshi*

## **XI Aldonoj**

Mallongigoj  
Bibliografio de la verkoj de Humphrey Tonkin

## **2 Omaĝo al Humphrey Tonkin**

*Detlev Blanke, Ulrich Lins*

Ni represas parton de la omaĝa enkonduko al la festlibro. Ni ankaŭ atentigas pri la angla superrigardo pri la biografio de H. Tonkin: <http://uhaweb.hartford.edu/tonkin/bio.html>.

“[...] Humphrey Tonkin naskiĝis la 2-an de decembro 1939 en Truro en Cornwall, la iam kelta sudokcidenta parto de Anglio (pri ĝi legu la ĉi-libran kontribuon de Kimura). Li studis anglan filologion en la Universitato de Kembriĝo (Cambridge, Anglio) kaj akiris diplomon en 1962. Samjare stipendio ebligis al li postdiplomajn studojn en Usono, nome en la prestiĝa Universitato Harvard (Cambridge, Massachusetts). Li frue malkovris sian amon al la brita renesanca literaturo. Tio en Harvard gvidis lin al doktoriĝo pri la ĉefverko de Edmund Spenser (1552-1599), *The Faerie Queene* (La fe-reĝino). Nun li estas konsiderata unu el la ĉefaj specialistoj pri Spenser, kiel montras interalie lia estraraneco en la “Renaissance Society of America” kaj membreco en la redaktaj komitatoj de la eldonaĵoj *Spenser Studies* kaj *Medieval and Renaissance Literary Studies*. En 1983/84 li estis prezidanto de “International Spenser Society”. En sia kontribuado al tiu ĉi libro Baldur Ragnarsson atentigas, ke Tonkin multe okupis sin ankaŭ, precipe en la lastaj jaroj, pri William Shakespeare.

Post la doktoriĝo Tonkin estis unue docento, poste profesoro pri angla literaturo ĉe la Universitato de Pensilvanio, Filadelfio, kie li ankaŭ je diversaj stadioj rolis kiel asista vicprezidanto pri subdiplomaj studoj (kun respondeco pri reformo de la bakalaŭraj studprogramoj de la universitato), kiel estro de la Kolegio Stouffer ĉe la universitato, kunordiganto de internaciaj programoj, kaj direktoro de unuajaraj studoj en la angla. De 1983 ĝis 1988 li estis prezidanto (rektoro) de la Kolegio Potsdam, apartenanta al la Ŝtata Universitato de Novjorko. En 1989 li sekvis inviton iĝi prezidanto de la Universitato de Hartford (Hartford estas la ĉefurbo de la usona ŝtato Connecticut). En tiu funkcio li sukcesis altigi la intelektan kaj sciencan reputacion de la universitato. Ekzemple, li organizis la aliĝon de plia kolegio al la universitato, fondis novan kolegion por dumviva klerigado, formis novajn ligojn kun la urbaj instancoj de Hartford (inkluzive stipendian programon), intensigis la internaciajn kontaktojn de la universitato kaj signife kreskigis ĝian kapitalon.

Post sia retiriĝo de la prezida ofico en 1998 li plu instruadas en Hartford kiel “University Professor of the Humanities”, la plej alta profesora rango atingebla en Usono. Li lekcias pri Shakespeare por la angla kaj la teatra fakoj de la universitato, kaj pri la rilatoj inter lingvo kaj socio por la fako pri fremdaj lingvoj. En 1999 prof. Tonkin ricevis honoran doktorecon de la Universitato de Hartford. Humphrey Tonkin prelegis en multaj landoj pri literaturo, internaciaj studoj, lingvopolitiko, Esperanto kaj aliaj temoj. En 1975/76 li pasigis unujaran esplor-restadon en la Universitato de Oksfordo, Anglio. Li estis gastprofesoro pri angla kaj kompara literaturoj en la Universitato Columbia, Novjorko (1980-1981) kaj en la Universitato Yale, New Haven (1998-1999).

Necesas konstati, ke Tonkin ne nur estas elstara literatursciencisto, sed ĉiam forte interesiĝis pri lingvistiko. Tion montras liaj socilingvistikaj, interlingvistikaj kaj esperantologiaj aktivadoj kaj verkoj, sed ankaŭ lia membreco en la estraro de la Centro pri Aplika Lingvistiko en Vaŝingtono kaj en la redaktaj komitatoj de la revuo *Language International* (1990-1996) kaj la libroserio *Impact: Studies in Language and Society* (1996-1999). De 1979 ĝis 1983 li estis redaktoro de *International Education Review*. Inter liaj anglalingvaj verkoj troviĝas libroj pri la poezio de Edmund Spenser kaj granda nombro da sciencaj artikoloj. Kune kun sia posta edzino Jane Edwards li verkis libron pri internacia edukado (*The World in the Curriculum*, 1981). Li krome redaktis plurajn kolektojn de artikoloj kaj konferencaj aktoj, laste *Language in the 21st Century* (kun Timothy Reagan, 2003). En la fino de tiu ĉi volumo troviĝas plena listo de la verkoj de Tonkin.

Ne estas surprize, ke en la universitata aktivado de Humphrey Tonkin ĉiam tre gravis la internacia perspektivo. Specialan atenton li donis al la internacia interŝanĝo de studentoj kaj profesoroj. Lige kun tio li estis estrarano de la Kanada Komisiono Fulbright (1998-2003), de la “American Forum for Global Education” (1998-2003) kaj de la programo “World Learning”, kiu celas frue eduki al internacieca pensmaniero (1998-2007). Li prezidis la Konsilion por Internacia Interŝanĝo de Universitatoj (CIES, 1988-1994), kiu administras la Programon Fulbright por la internacia interŝanĝo de profesoroj. Li daŭre estas ankaŭ estrarano de la “International Partnership for Service-Learning and Leadership”, kiu subtenas la kunligon de universitataj studoj kaj socia servado (pri tio li kunverkis kaj redaktis la libron *Service-Learning Across Cultures: Promise and Achievement*, 2004).

Sed li agadis ne nur laŭ internaciaj dimensioj. Kvazaŭ por subteni la principon, ke en epoko de tutmondiĝo gravas ne perdi la ankriĝon en loka kadro, prof. Tonkin prizorgas ankaŭ sian ĉirkaŭaĵon. En Potsdam li kunfondis du lokajn organizaĵojn pri ekonomia evoluigo. Li estas konsiliano de la Usona Lernejo por Surduloj, de la Hartforda Hospitalo kaj de la urba biblioteko. Antaŭe li estis estrarano de la Simfonia Orkestro de Hartford, la regiona konsilio pri belarto kaj la regiona Konsilio pri Mondaj Aferoj (World Affairs Council).

Jam en 1970 Humphrey Tonkin ricevis la Lindback-premion pro elstara lekciado. Inter la diversaj aliaj honorigoj, kiujn li ricevis, estas premioj pro liaj meritoj pri la urbo Hartford, lia laboro por homaj rajtoj, kaj lia agado pri dumviva edukado. La usona asocio de internaciaj edukistoj (NAFSA) donis al li en 2006 la Premion Cassandra Pyle. Humphrey Tonkin havas du ŝtatanecojn, la britan kaj la usonan.

Li estas samtempe “mondano”, kiel montras lia esperantisteco. Li lernis la lingvon kiel 15jara gimnaziano. Sekvinte korespondan kurson de Brita Esperanto-Asocio (BEA), li metis anonceton en *Heroldo de Esperanto*. Preskaŭ kvar jardekojn poste li memoris: “Kiel frenezulo, mi komencis korespondi kun ĉiuj ... kvindek reagintoj! Kaj efektive mi tiel lernis pli ol ĉe kursoj.” (Intervjuo, *Kontakto*, 1993, n-ro 137/138, p. 2) La unuajn paŝojn en “Esperantujo” li faris antaŭ kaj paralele al sia studado. Jam frue montriĝis lia organiza talento. Studante en Kembriĝo, li iniciatis la fondon de junulara sekcio de Brita Esperanto-Asocio, la Junularo Esperantista Brita (1960). Li krome organizis la 17-an TEJO-kongreson en Wokingham; tie li eniris la estraron de TEJO (1961). Pri tiu frua periodo vive rakontas la ĉi-libraj kontribuajtoj de Marjorie Boulton kaj Diccon Masterman, same, ankaŭ pri la posta kariera kaj movada evoluo, la jam menciita intervjuo de Mark Fettes kun Tonkin.

De 1969 ĝis 1971 Tonkin estis prezidanto de TEJO. En tiuj jaroj li instigis la junularan Esperanto-movadon malfermi sin al la ĉirkaŭa socio kaj forlasi tro malvaste komprenatan neŭtralecon. Tion ekzemple atestas la Deklaracio de Tyresö, pri kiu en tiu ĉi libro memorigas la kontribuajtoj de Tomas Jansson, Ulla Luin kaj Ivo Osibov. Post dekjara estraraneco en TEJO li decidis retiriĝi, ankaŭ por havi pli da tempo por siaj universitataj taskoj. Sed jam en 1974, responde al insista petado, li konsentis esti kandidato por la gvida posteno en UEA. Tio okazis en komplika situacio. Ne eblis trovi interkonsenton kun la ĝistiam prezidanto, Ivo Lapenna, kiu en oktobro 1973 proponis al Humphrey Tonkin eniri la estraron kiel ĝenerala sekretario. Lapenna estis homo, kiun Tonkin admiris kaj kiu estis lia ĉefa modelo kiel movada gvidanto. Li multon lernis de Lapenna – el lia profunda kono de la Esperanto-movado kaj lia maniero prezenti la lingvon al la ekstera mondo. Tamen en la rilatoj inter Lapenna kaj multaj

aktivuloj amasiĝis problemoj kaj kontraŭdiroj. Fine Lapenna ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj de UEA. Tonkin, ankoraŭ ne 35-jara, iĝis prezidanto. Lian prezidantecon akompanis fortaj emocioj sekve de la foriro de Lapenna, sed Tonkin suverene demonstris, ke li preferas persiste labori por la bono de UEA kaj ĝiaj membroj. La unua, sesjara prezidado de Humphrey Tonkin estas memorata unuavice pro siaj efektivaj atingoj: la akcepto de nova statuto de UEA, la intensigo de la kontaktoj kun UN kaj Unesko (kio rezultigis plialtigon de la nivelo de konsultaj rilatoj kaj rezolucion de Unesko apogon al la laboro de UEA), kaj la restabiligo de la Asocio post malfacila organiza periodo. Kreiĝis, en la formo de la Societo Zamenhof, membrokategorio por mecenatoj, kaj en 1975 la Komitato unuanime akceptis Financan Programon de la Esperanto-Movado. Kiel rekonas Gregoire Maertens en tiu ĉi libro, la literatursciencisto Tonkin ĉi-rilate pruvis, ke li estas samtempe “bona manaĝero”.

Prezidanto Tonkin povis rapide silentigi la plej multajn dubantojn, ankaŭ pro sia toleremo kaj sia preteco aŭskulti la argumentojn de aliaj. Estas karakterizaĵo lia, ke li lerte scias disdoni taskojn kaj samtempe ĉiam kuraĝigas al ties plenumo, ne ŝparante helpon kaj konsilon. Stimulan efikon havis lia senĉese rimarkebla agemo. Tre malofte li permesis al si aludon al la grandaj personaj streĉoj, kiujn postulas la pormovada laboro. Taglibran raporton pri la 67-a UK en Antverpeno (1982) li titolis “Ĉu ni mistraktas niajn gvidantojn?” Kun nur duona ironio li demandis: “Ĉu do okazis en Antverpeno plia pruvo pri la vivkapablo de Esperanto aŭ plia provo de la eltenkapablo de la funkciuloj?” (*Heroldo*, 1982, n-roj 1705 kaj 1706). En 1980 finiĝis la du unuaj deĵorperiodoj de Tonkin kiel prezidanto. Li mem nomis sian prezidantecon “transira periodo”, sed en tio li malpravus, ĉar efektive ĝi estis mejloŝtona: li repacigis la movadon kaj multe helpis ŝanĝi ĝian etoson. Senpatose li komunikis, ke li ĉesas esti prezidanto por resti kaj pluaktivi en UEA (kiel “simpla” estrarano) kaj la movado. En 1986 li estis persvadita refariĝi prezidanto, tiel ke la agado de UEA pro la centjara jubileo de Esperanto povis profiti de liaj impulsoj kaj aŭtoritato.

Humphrey Tonkin ĉiam montris, ke li bone komprenas la eksteran mondon, precipe kiam temas pri la partneroj de la Esperanto-movado. Dum multaj jaroj, ekde kiam la 19-jarulo vizitis la Varsovian Kongreson en 1959, lia atento koncentriĝis al la rilatoj inter okcidenta kaj orienta Eŭropo. Kiel prezidanto de TEJO kaj de UEA li ofte devis fronti defiojn, kiujn estigis la Malvarma Milito kaj la politik-ideologia divido de la mondo. Necesis zorgi, ke la landaj asocioj de malsamaj blokoj restu kune en la kadro de la neŭtrala UEA. Sian scion pri la mondo la juna prezidanto larĝigis per multaj vojaĝoj: li vizitis Iranon (antaŭ la islama revolucio), Baraton, Sovetunion (vidu la kontribuojn de Mikaelo Bronŝtejn), Japanion kaj aliajn landojn. En 1978 li iris al Rumanio kun la celo mildigi la negativan sintenon de ties aŭtoritatoj al la Esperanto-movado. Lia dua prezida periodo finiĝis tuj antaŭ la grandaj ŝanĝoj en Eŭropo de 1989/90: tiam ĉesis epoko, en kiu “neŭtraleco ofte egalas al sukcesa klopodo eviti ofendi la du flankojn” (Tonkin en *Esperanto*, 1992, p. 147), ĉu okcidentan aŭ orientan Eŭropon. UEA poste povis turni pli da atento ankaŭ al ekstereŭropaj regionoj.

Kiam John Wells transprenis la gvidon en 1989, li povis daŭrigi sur la tonkina vojo, kunhelpante ke UEA forlasu la troan fiksiĝon al Eŭropo kaj pli forte enplektu ankaŭ la kapablojn kaj spertojn de organizaĵoj kaj individuoj en Azio kaj Latina Ameriko. La ekŝiĝo en 1989 liberigis por Tonkin rezervojn, kiujn li povis disponigi al aliaj kampoj de Esperanta agado. Jam dum la unua periodo de sia prezidanteco kaj precipe dum la naŭdekaj jaroj li intense zorgis pri la “scienca akompano” de la Esperanto-movado. Ekzemple, li montris, ke ne simple ekzistas “la monda lingvo-problemo”, sed tuta aro da mondaj lingvaj problemoj, en kies kadron oni devas meti la rolon de Esperanto kaj interpreti ĝin. Sekve, ni parolas ekde de la 80-aj jaroj pri la “Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj” – temas pri CED, kiun Tonkin gvidas ekde 1974 seninterrompe. Grandan atenton li dediĉis kaj daŭre dediĉas al pluevoluigo de la revuo *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado* (LPLP), kiu en monda skalo fariĝis unu el la ĉefaj lingvopolitikaj fakrevuoj; li ĉefredaktas ĝin kune kun Probal Dasgupta (vidu pri LPLP la kontribuon de Frank Nuessel en tiu ĉi libro). Li krome kunfondis kaj prezidas Esperantic Studies Foundation (ESF), kiu subvencias esplorojn pri internaciaj lingvaj demandoj. Li ankaŭ estas redaktoro de la libroserio *Studies in World Language Problems*. Lia aŭtoritato, akirita en lia profesia vivo, ofte estas grava kaj utila, kiam

necesas prezenti Esperanton antaŭ skeptikaj fakuloj. Por kompletigi la spektron, necesas aldoni multon. Humphrey Tonkin kreis, jam en 1974, la serion de *Esperanto-Dokumentoj*. Li redaktis kaj tradukis en la anglan la librojn de Pierre Janton, *Esperanto: Language, Literature and Community* (1993), kaj de Tivadar Soros, *Maskerado* (2000, tradukitan ankaŭ en la rusan, hungaran, turkan kaj germanan). De tiu ĉi sama libro li redaktis la Esperantan reeldonon (2001). Li esperantigis, plej proksime al sia speciala fako, *Henriko Kvina* (2003) kaj *La Vintra Fabelo* (2006) de Shakespeare. Grandan atenton trovis lia plej lasta libro en Esperanto: *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado* (2006). Li estas bibliografo por la usona Modern Language Association (MLA) kaj ĉefrespondencas pri ties registrado de novaj eldonaĵoj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Tonkin ekde 1983 estas ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto.

UEA sciis aprezi la elstaran kontribuon de Humphrey Tonkin. Tial en 1995 li estis invitita iĝi membro en la Honora Patrona Komitato (HPK), kuniganta eminentajn personojn el literaturo, scienco kaj politiko, homojn kiuj simpatias al la celoj de la Esperanto-movado. Tonkin do enviciĝis inter la anoj de HPK, kiuj, laŭ la juĝo de UEA, estas elstaraj en sia fako, sed de kiuj ĝi ne atendas aktivan rolon en la Esperanto-movado. Tio substrekas la rekonon, kiun ĝuas Tonkin kaj en kaj ekster la movado. Tamen, kiam necese, Humphrey Tonkin denove estis preta doni gravan kontribuon al UEA.

Simile kiel en 1986, kiam la eksa prezidanto konsentis resti nura estrarano, li en 2001, jam membro de HPK, denove flankenŝovis hierarkiajn konsiderojn. Li, nome, deklaris sian pretecon ankoraŭfoje eniri la estraron de UEA kiel vicprezidanto. Dum tri jaroj li helpis venki krizon, en kiu la asocio troviĝis pro malakordo inter estraranoj kaj oficistoj de la CO. La krizo estas venkita, sed Tonkin restas je dispono. Li esence kontribuis al la modernigo de la Universalaj Kongresoj kaj malavare donas kritikojn kaj proponojn por adapti UEA al la rapide ŝanĝiĝantaj kondiĉoj de la elektronika epoko sub la influoj de la tutmondiĝo. Kiom aktiva estas lia partopreno, povas bone observi kongresanoj: en preskaŭ ĉiu UK Humphrey Tonkin tre videble rolas – kiel reĝisoro de la diskutoj pri la kongresa temo, kiel organizanto de la Kleriga Lundo, kiel prezidanto de la komisiono pri la Belartaj Konkursoj, kiel preleganto en IKU kaj, tre populare, kiel gvidanto de aŭkcio. La granda mobiliza kapablo de Tonkin evidentiĝas eble plej okulfrappe per liaj kongresaj paroladoj, sed efektive samgrade per liaj intervenoj en kunsidoj, argumentoj en konversacioj kaj apenaŭ nombreblaj artikoloj.[...]

### 3 Omaĝaj vortoj de Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof

*Omaĝon al vi, Humphrey, kara amiko mia: sepdekjarulo daŭre kaj senĉese juna, same mense kiel korpe. Mi diras amiko, ĉar mi fieras konsideri min la amiko de elstara eminentulo de la Esperanto-movado. Ĉu Prezidanto, ĉu Prezidinto de nia Universala Asocio, vi ĉiam restadas senkompara aŭtoritatulo, same pri organizado, pri gvidado, kiel pri la lingvo mem, estante renoma sciencisto, universitata profesoro, verkisto kaj tradukisto.*

*En Pollando, la lando de mia infaneco, oni kutimas, festante naskiĝ-datrevenon, kanti “sto lat, sto lat”. Tiuj kantvortoj signifas bondeziron por centjara vivo. Vivu do almenaŭ cent jarojn, Humphrey kara, kaj restu eterne vivanta en la koroj de generacioj estontaj !*

### 4 Bibliografio de la verkoj de Humphrey Tonkin

La sekva bibliografio, aranĝita en kronologia ordo kaj laŭ ĉapitroj, enhavas ĉiujn publicaĵojn, kiujn Humphrey Tonkin verkis. La prezento-maniero estas adaptita al la eŭropaj kutimoj. Versioj de la sama eldonaĵo en pliaj lingvoj aperas kiel apartaj eroj; represoj aperas kiel parto de la originala ero, krom se ili distancas je pluraj jaroj. La ĉefa fonto de la materialo estas la jena: <http://uhaweb.hartford.edu/tonkin/pdfs/Verkaro%20en%20au%20pri%20Esperanto.pdf>. Prof. Tonkin kelkloke korektis kaj aktualigis tiun liston. La bibliografio estas dividita en jenajn partojn:

- 1 Monografioj
- 2 Redaktitaj antologioj kaj aliaj verkoj
- 3 Tradukoj
- 4 Artikoloj
- 4.1 Esperanto kaj interlingvistiko, pri lingvoj kaj lingvo-politiko.
- 4.2 Literaturo, edukado kaj aliaj temoj

### Mallongigoj

ed. anglalingve redaktis/editoris  
 HEJS Hispana Esperantista Junulara Societo  
 IJK Internacia Junulara Kongreso (de TEJO )  
 JEB Junularo Esperantista Brita  
 JEL Jugoslavia Esperanto-Ligo  
 JEN Junularo Esperantista de Nordameriko  
 k kaj  
 ps. pseŭdonimo  
 red. redaktis  
 SLEA Sveda Laborista Esperanto-Asocio  
 TEJO Tutmonda Esperantista Junulara Organizo  
 tr. tradukis

### 4.1 Monografioj<sup>1</sup>

- 1966. *Shakespeare in Esperanto 1884-1965: A Bibliography*. Rotterdam: Centre for Research and Documentation on the World Language Problem. 22pp.
- 1971. *Sir Walter Raleigh*. Elizabethan Bibliographies Supplements. London: Nether Press. 79pp.
- 1972. *Spenser's Courteous Pastoral: Book Six of The Faerie Queene*. Oxford: Clarendon Press (Oxford University Press). 328pp.
- 1972. (kun Ulla Luin). *Kiel organizi internacian junularan kongreson (kaj aliajn renkontiĝojn)*. Tyresö. 40pp.
- 1972. (with Patricia Meyers and Richard Beeman). *The Advancement of Undergraduate Education. Almanac* (University of Pennsylvania). Supplement. 4pp.
- 1975. *Unesco and the UEA: The Contribution of the Universal Esperanto Association to the Work of Unesco, 1954-1974*. Esperanto Documents 1-A. Rotterdam: UEA. 8pp.
- 1975. *Unesko kaj UEA: La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la laboro de Unesko, 1954-1974*. Esperanto-Dokumentoj 1-E. Rotterdam: UEA. 9pp.
- 1976. *An Introduction to Esperanto Studies*. Esperanto Documents 6-A. Rotterdam: UEA. 12pp.
- 1976. *Enkonduko al Esperanto-studoj* (tr. Ian Jackson). Esperanto-Dokumentoj 4-E. Rotterdam: UEA. 15pp.
- 1976. *Esperanto on the Air: A Half-Century of Broadcasting in the International Language, 1922-75*. Esperanto Documents 7-A. Rotterdam: UEA. 10pp.
- 1976. *Esperanto tra la etero: Duonjarcento da radio-disaŭdigoj per la Internacia Lingvo 1922-75*. Esperanto-Dokumentoj 3-E. Rotterdam: UEA. 8pp.
- 1976. *Amikeco trans limoj: La Semajno de Internacia Amikeco*. Konsilaroj pri Esperanto-Agado 1. Rotterdam: UEA. 4pp.
- 1976. *La Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo*. Konsilaroj pri Esperanto-Agado 2. Rotterdam: UEA. 8pp.
- 1976. (kun Victor Sadler). *Rekomendita terminaro Esperanto-angla por tradukantoj de Esperanto-Dokumentoj*. Konsilaroj pri Esperanto-Agado 3. Rotterdam: UEA. 15pp.

---

<sup>1</sup> Estas listigitaj ĉiuj memstaraj broŝuritaĵoj aŭ binditaj publicaĵoj, sendepende de la amplekso.

1976. *Financa evoluigo: Manlibro pri la financa programo de la Esperanto-movado*. Konsilaroj pri Esperanto-Agado 4. Rotterdam: UEA. 64pp.
1977. *Esperanto and International Language Problems: A Research Bibliography*. Washington: Esperantic Studies Foundation. 4th ed. (1-a eld. 1967; 2-a eld. 1969; 3-a eld. 1972). iii + 45pp.
1977. *Esperanto and the Universal Esperanto Association*. Esperanto Documents 12-A. Rotterdam: UEA. 7pp.
1977. *Language problems and the Final Act*. Esperanto Documents 11-A. Rotterdam: UEA. 7pp.
1977. *Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto*. Esperanto-Dokumentoj 7-E. Rotterdam: UEA. 8pp.
1979. (kun Grahame Leon-Smith). *The Future of Modern Languages in English-Speaking Countries*. (Represo de artikolo en *ADFL Bulletin* 1977). Esperanto Documents 18-A. Rotterdam: UEA. 20pp.
1979. (kun Claude Piron). *Translation in International Organizations*. Esperanto Documents 20-A. Rotterdam: UEA. 32pp.
1979. *Language and International Communication: The Right to Communicate*. Esperanto Documents 15-A. Rotterdam: UEA. 12pp.
1979. *Langage et communication: le droit à la communication*. Documents sur l'espéranto 4-F. Rotterdam: UEA. 12pp.
1979. *The Use of the International Language Esperanto as a Partial Solution to Language Problems in International Nongovernmental Organizations: Some Recommendations*. Esperanto Documents 16-A. 10pp.
1979. *La uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvoproblemoj en internaciaj neregistaraj organizoj: kelkaj rekomendoj*. Esperanto-Dokumentoj 12-E. Rotterdam: UEA. 12pp.
1981. (with Jane Edwards). *The World in the Curriculum: Curricular Strategies for the 21st Century*. New Rochelle: Change Magazine Press. 262pp.
1982. (kun Thomas Hoeksema). *Esperanto and Literary Translation*. Esperanto Documents 29-A. Rotterdam: UEA. 36pp.
1982. *Esperanto in the Service of the United Nations*. Esperanto Documents 27-A. Rotterdam: UEA. 18pp.
1984. (kun Thomas Hoeksema). *Espéranto et traduction littéraire*. Documents sur l'Espéranto 16-F. Rotterdam: UEA. 40pp.
1987. *The International Language Esperanto 1887-1987: Towards the Second Century*. Esperanto Documents 39-A. Rotterdam: UEA. 14pp.
1989. *The Faerie Queene*. Unwin Critical Library. London: Unwin Hyman. 282pp.
1989. *Inaugural Address*. University of Hartford. 4pp.
1996. (kun Mark Fettes). *Esperanto Studies: An Overview*. Esperanto Documents 43A. Rotterdam: UEA. 16pp.
2002. *The International Partnership for Service-Learning: A Review of the Demographics of the Undergraduate Programs*. New York: International Partnership for Service Learning. 31pp.
2003. *Language and Society*. Issues in Global Education. New York: American Forum for Global Education. 24pp.
2006. *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA. 159pp.
2008. *Tuj apude: Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA*. Rotterdam: UEA. 56pp.
2009. *Una lingua e un popolo: Problemi attuali del movimento esperantista*, tr. Elvia Belluco, red. Carlo Minnaja. Venafro: Edizioni Eva. 170pp. (itala traduko de *Lingvo kaj popolo*, 2006).

## 4.2 Redaktitaj antologioj kaj aliaj verkoj

- 1972 (red.). *Winnie-la-Pu*, de A. A. Milne, tr. Ivy Kellerman Reed k Ralph A. Lewin. New York: E. P. Dutton. 164pp.
- 1974 (ed.). *Undergraduate Education at the University of Pennsylvania*. Philadelphia: University of Pennsylvania. 104pp.
- 1976 (red.). *Argumentado por Esperanto: kelkaj dokumentoj pri Esperanto-informado*. Konsilaroj pri Esperanto-Agado 5. Rotterdam: UEA. 4pp.
- 1978 (red., kun Renato Corsetti k Probal Dasgupta). *Language and the Right to Communicate*. Esperanto Documents 13-A. Rotterdam: UEA. 40pp.
- 1978 (red., kun Renato Corsetti k Probal Dasgupta). *La lingvo kaj la rajto je komunikado*. Esperanto-Dokumentoj 11-E. Rotterdam: UEA. 46pp.
- 1979 (red., kun Renato Corsetti k Probal Daŝgupto). *Langue et droit à la communication*. Documents sur l'espéranto 6-F. Rotterdam: UEA. 48pp.
- 1983 (ed.). *World Communications Year 1983: Language and Language Learning*. Report of a Conference Sponsored by the Center for Research and Documentation on World Language Problems and the Esperantic Studies Foundation. New York: The Center. 95pp.
- 1984 (red.). *Monda Komunika Jaro: sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado*. Rotterdam: UEA. 11pp.
- 1984 (ed., with Jane Edwards). *Language Behavior in International Organizations*. Report of the Second Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: The Center. 155pp.
- 1985 (ed., with Karen Johnson-Weiner). *Language Planning at the International Level*. Report of the Third Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: The Center. 152pp.
- 1986 (ed., with Karen Johnson-Weiner). *The Idea of a Universal Language*. Report of the Fourth Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: The Center. 133pp.
- 1986 (ed., with Karen Johnson-Weiner). *Overcoming Language Barriers: The Human/Machine Relationship*. Report of the Fourth Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: The Center. 117pp.
- 1987 (ed., with Karen Johnson-Weiner). *The Economics of Language Use*. Report of the Fifth Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: The Center. 163pp.
- 1988 (ed.). *Language and Culture in International Organizations*. Report of the Sixth Annual Conference on Language and Communication. New York: Center for Research and Documentation on World Language Problems. 95pp.
- 1988 (ed., with Allison Armstrong Keef). *Language in Religion*. Report of a conference sponsored by the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: The Center. 141pp.
- 1989 (ed., with Allison Armstrong Keef). *Language in Religion*. Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems, vol. 1. Lanham, MD: University Press of America. 121pp.
- 1996 (ed.). *Languages in International Organizations*. Report of the Thirteenth Annual Conference on Language and Communication. Hartford: Center for Research and Documentation on World Language Problems. 57pp.
- 1997 (ed.). *Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language*. Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems 5. Lanham MD: University Press of America. 232pp.
- 1998 (ed.). *A University for Hartford, A University for the World: A Short History of the University of Hartford*. Hartford: University of Hartford. 97pp.

